

P A C O kaj J U S T E C O .

1946

Monata revuo de la grupo B r u g g e .Sekcio de Flandra  
Ligo Esperantista

.....  
 : Prezidanto: Drs. F. Roose, J. & M. Sabbestraat 12, Brugge. Tel: 31981.  
 : Sekretariejo: Roose-De Kersgieter, J. & M. Sabbestraat 12, Brugge.  
 : Propagando: Maertens Gr., Nieuwstraat 54, Assebroek.  
 : Poŝtkonto: 291429, Maertens Gr., Assebroek.  
 : .....

La Sanktrestaĵoj en la preĝejo "S-ta Donaciano" en Brugge.

Tiu preĝejo, kiu estis la katedralo, ne plu ekzistas. Dum la Franca revolucio ĝi estis detruata. Ĝi staris sur la Burgplaats (burgo-placo = fortikaĵloko) tie kie estas nun la arboj. Post la Franca revolucio, kiam estis denove episkopoj en Brugge, la preĝejo de la Sankta Savinto iĝis la katedralo. Sajne tiu preĝejo estis tre interesa ankaŭ laŭ arkitektura vidpunkto. La konstrumaniere estis la sama kiel de la du imperiestraj kapeloj en Nijmegen kaj Aken. Oni ne precize scias kiam ĝi estis ekkonstruata. Sed la du ĵus nomitaj datumas el la regno de imperiestro Karlo la Granda, kiu mortis en 814. Kaj tre versaj nexla invadon de la Nordanoj. Sed mi volas peti vian atenton por io alia. Dum mi faris historiajn serĉojn pri la Bruĝaj preĝejoj, mi trovis liston de la sanktrestaĵoj konservitaj en la S-ta Donacianokatedralo. Mi trovis ĝin en dokumentaro datumanta eal la 14a jarcento. La mezaĝo estas tempo de tre granda religio. Plej gravan gravecon oni atribuis al la posedo de sanktrestaĵoj. Grandegaj festoj okaziskiam oni transportis sanktrestaĵojn. Tiuj objektoj estis konsiderataj kiel plej taŭgaj protektiloj. La posedo de granda kvanto da tiaj aĵoj plialtigis la gloron de ĉiu preĝejo aŭ monaĥejo. La religiaj komununoj havantaj riĉan kolekton da relikvoj kredis sin en rajto al akiro de favoroj diversspecaj. Tial oni ne timis "fabriki" relikvojn! aŭ steli, aŭ rabi, aŭ militi. En 1127 la Grafo de Flandrujo Karlo la Bona estis mortigata en nia S-ta Donaciano-preĝejo. La mortigintoj protektis sin en la preĝejo mem kie kuŝis la korpo de l' mortigito. De ekstere oni klopodis enveni la konstruaĵon. Inter la trupoj kiuj volis venĝi la grafon, estis ankaŭ grupo da Gentanoj. Dufoje, nokte, du soldatoj klopodis en sekreto enveni laŭ la altaj fenestroj. Sed dufoje, pro la malhelo kaj ne sufiĉa kono de la konstruaĵo, ili falis kaj perdis la vivon. La bruĝa kronikisto kiu ĉion rakontas pri tiuj okazintaĵoj kaj kiu travivis ilin ĉiujn diras ke la Gentanoj faris tion por steli la korpan relikvon de la Grafo kaj forporti ĝin al Gent.

Jen mi tradukas preskaŭ laŭlitere la liston el la Latina lingvo.  
 "Ĉi sekvas la relikvoj de la sanktuloj kiuj estas en la preĝejo de S-ta Donaciano kaj unue tiuj kiuj rilatas al la Disinjoro Jezuo Kristo. Multo de Liaj vestaĵoj, de Liaj sandaloj, de Lia loĝejo, de Lia tolaĵo de la ligno kaj kruco de la Disinjoro, de Lia tombejo, de Lia tablo, de Lia spongo, de la dornokrono, de Lia viŝtuko, de la sango de Lia vizaĝo, de la ŝtono de l' Disinjoro, de la ujo en kiu la Disinjoro dum la lasta manĝo lavis la piedojn de siaj disciploj, de la viŝtuko per kiu Li sekigis la piedojn, de la kolono al kiu la Disinjoro estis vipata, de la marmoro sur kiu la Disinjoro naskiĝis, de la mantelo per kiu li estis vestata, de la vinberujo kiun la Disinjoro plantis, de la bastono de Aaron per kiu li faris miraklojn en Egiptujo kaj per kiu li kondukis la popolon de la Disinjoro tra la ruĝa maro kaj tra la dezerto. De la Kalvarimonto, de la Olivomonto. Iom da tero de la Jordano kaj iom de la orŝtono kiun la saĝuloj oferis al la Disinjoro. De la ŝtono sur kiu staris la Disinjoro kiam li diris al Petro "vi estas petro k.t.p...". Restaĵoj de la kvin panoj kaj de la sep korboj da manao per kiu li nutris sian popolon en la Dezerto. De la tombejo el kiu li revivigis la-zaron.  
 "Relikvoj de la Sankta Maria, patrino de nia Disinjoro Jezuo Kristo.  
 "Haroj de la Sankta Maria, patrino de nia Disinjoro Jezuo Kristo. Relikvoj de la S-ta Maria. Lakto de Ŝi. Iom de Ŝia tuniko, de vualo de Ŝi, de mantelo de Ŝi, de vestaĵoj kaj piedvestoj de Ŝi, iom de Ŝia lito kaj aliaj relikvoj de Ŝi.  
 "Relikvoj de Sankta Johano Baptisto kaj de aliaj profetoj.

x x iu fortikaĵo (kun kapelo aŭ preĝejo?) estis konstruata en la daŭro de la 9a jarcento por malhelpi.....

"Sango de Sankta Johano Baptisto. Dento de li. Vestaĵoj kaj haroj de li.  
"Tom de lia tombo. Tom de la ostoj de profetoj Samuel kaj Zaĥarias. Re-  
"likvoj de la profeto Jonas, de Sanktaj Simon kaj Anna, kaj de la tri  
"infanoj Sidrak, Misaĥ kaj Abdenago.  
"Relikvoj de la apostoloj kaj evangelistoj.  
"Dento de la Sankta Petro kaj ostoj de li. Tom de lia barbo kaj de liaj  
"haroj, de lia kruco, de lia tuniko, de lia stolo, de lia katedro. Tom de  
"la tombo de la evangelisto Sankta Johano kaj de la mano kiu ekfloris,  
"el ĝi. Tom de lia tablo kaj de lia lito. Tom de la sango de Sankta Paŭlo,  
"de lia barbo, de liaj haroj. Aliaj relikvoj de la apostoloj Petro kaj  
"Paŭlo. Tom de la kapo de S-ta Bartolomeo. Relikvoj de la apostoloj An-  
"dreo kaj Matteo. Ankaŭ iom de la kruco de la apostolo S-ta Andreo. Du  
"dentoj de la apostoloj Jakobo kaj Filipo kaj aliaj relikvoj de ili. Re-  
"likvoj de la apostoloj Simon kaj Judo. Tom de la tablo de la apostoloj.  
"Relikvoj de la Martiroj.  
"Tom de la ostoj de la Sankta Papo Klemens. De la sango kaj ostoj de la  
"S-ta Stefano. De la ŝtonoj per kiuj li estis ŝtonmortigata kaj aliaj  
"relikvoj de la sama. Fingroj kaj sango de Innocencio. Dento de la S-ta  
"Laurentius. Ostoj de li kaj iom de la krado sur kiu li estis rostata.  
"Vestaĵoj de li, zono kaj aliaj relikvoj de la sama.  
"Tom de la brako de S-ta Siksto. Dento de S-ta Kornelio. Relikvoj de la  
"sama kaj ankaŭ de S-ta Cipriano. Dento de S-ta Kristoforo. Osto de lia  
"mano. Osto de lia kapo. Haroj kaj vestaĵoj de li. Fingro de S-ta Seba-  
"stiano. Dento de S-ta Kuinteno. Sango kaj vestaĵoj de li. Relikvoj de  
"la S-ta Dianisio kaj de liaj kunuloj. Haroj de la sanktuloj Krispeno  
"kaj Krispiniano. Ostoj de S-ta Leodegario. Haroj de ili kaj ankaŭ iom  
"de iliaj sandaloj. La sama de la sanktuloj Kosmo kaj Obmiano. Ostoj de  
"la sanktuloj Ionio kaj Paŭlo kaj Pankratio kaj Albano. Tom de la kapo  
"de la S-ta Menna. Tom de la brako de S-ta Georgio kaj aliaj relikvoj  
"de la sama kaj ankaŭ de la sanktuloj Lamberto, Magno, Kaliksto. Fingro  
"de S-ta Juliano. Relikvoj de la sanktuloj Marcello kaj Petro; de S-ta  
"Eikasio ĉefepiskopo de Reims kaj de lia fratino; de S-ta Vincentio,  
"Adriano. Relikvoj de la martiro S-ta Hipolito. Dento de S-ta Livino.  
" Relikvoj de konfesantoj.  
"La korpo de S-ta Donaciano kiu estis la sepa ĉefepiskopo de Reims. Ĝran-  
"da parto de la korpo de S-ta Krisolio ĉefepiskopo de Amiens. Du dentoj  
"de S-ta Marteno. Ostoj de li. Tom de lia mantelo kaj aliaj vestaĵoj.  
"Ripo de S-ta Maĥato (:Maĥario?) kaj aliaj ostaĵoj de li. Lia ringo.  
"Fingro de la papo S-ta Gregorio. Osto de S-taj Patricio kaj Albino.  
"Relikvoj de S-ta Severino. Ostoj de S-ta Hilario. Relikvoj de S-ta Ger-  
"mano episkopo de Kapua. Du ripoj de S-ta Maksimo. Lia kruro. Du os-  
"toj de lia brako. Kvin ostoj de liaj fingroj. Fingro de S-ta Benedikto  
"kaj du dentoj de S-ta Davo kaj lia barbo. La brako de S-ta Gaŭgerici.  
"Relikvo de S-ta Amando kaj iom de lia barbo. De S-taj Vedasto, Remigio,  
"Aŭdomaro du fingroj. Du fingroj de S-ta Bertino. Du fingroj kaj du den-  
"toj de S-ta Vandregiselus. La dekstra dikfingro de S-ta Folkvino. Unu  
"dento de la S-ta Trudo kaj io de lia kapo. Relikvo de la Sankta papo  
"Aleksandro. Tom de la ŝultro de S-ta Paŭlino ĉefepiskopo. Io de la kapo  
"de S-ta Johano episkopo. Tri dentoj kaj brako de S-ta Teoderiko el  
"Reims. Du fingroj kaj du dentoj de S-taj Odulfo kaj Eriktio. Osto de  
"S-ta Eligio. Sep fingroj de S-ta Eusebio. Dento de S-ta Rikario. Re-  
"likvoj de S-ta Servatio. Relikvoj de S-ta Judoko. Relikvoj de S-ta Re-  
"maklo. Io de la kapo de S-ta Nikolao. Relikvoj de S-ta Ambrosio.  
" Relikvoj de virgulinoj kaj de sanktaj virinoj.  
"Tom de la fingro de S-ta Maria Magdalena. Haroj de ŝi kaj de ŝia fra-  
"tino Marta. Sango de S-ta Agnes. Aliaj relikvoj de la sama. Relikvoj de  
"S-ta Agata. Vestaĵo de ŝi. Tom de cerbo de S-ta Cecilia. Aliaj relikvoj  
"de la sama. Relikvoj de la S-ta Kolumba. Tom de la ŝultro de la S-ta  
"virgulino Juliana. Ankaŭ iom de la ŝultro de la S-ta virgulino Marga-  
"reta. Relikvoj de la S-ta Valburga. Tuniko de S-ta Frigida virgulino.  
"Relikvoj de S-ta Gertruda virgulino. Fingro de S-ta Berta. Relikvoj de  
"S-ta Helena.  
"Krom tiuj-ĉi relikvoj kiujn ni nomis estas en tiu-ĉi preĝejo honorataj,  
"depost jam tre antikva tempo, multaj aliaj gravaj relikvoj de martiroj  
"kaj atestantoj inter kiuj kelkaj estis papoj, aliaj ĉefepiskopoj, aliaj  
"episkopoj, aliaj pastroj, aliaj ekleziuloj de malpli altaj ordenoj, ali-  
"aj estis sanktaj laikuloj, ankaŭ de sanktaj virgulinoj kaj virinoj de  
"kiuj ni silentas la nomon por ke la tro longa citado ne veku enuon ĉe  
"la aŭdanto. Sed ni kredas sen ia dubo ke Dio per iliaj meritoj kaj pre-  
"ĝoj al ni, piuloj, preparos restadejon en la ĉielo."

Diversaj partoj de tiu-ĉi listo donas la impreson ke la kadavroj de  
sanktuloj estis tuj post morto distranĉataj (!) Fakte tio okazis ! aŭ  
preskaŭ.





+++++ +++++ Angulo de la Serĉemuloj! +++++ +++++  
-----  
+++++ Ciferenigmo. +++++

50 I4 9 67 5I 33 62  
35 23 24 60 64 II 60 26  
74 30 40 53 36 I5 34 2 45 58 70 67  
64 32 52 75 I2 7 I8 57  
I5 60 I9 I3 72 46 27 52 5  
I4 I7 23 53 IO 6I 43 49 65

-raba birdo  
-venono (R)  
-in kiu vojaĝas por iu firmo  
-ĉefpreĝejo (R) (R)  
-osto de nia korpo  
-speco de blua koloro (ad-  
jektivo)  
-muzikilo por eligi laŭtajn  
sonojn (R)  
-nomo de lando pri kiu ek-  
zistas konto (R)  
-plej fama mondlingvo antaŭ  
-ol aperis Esperanto  
-milpieda besto (R)  
-katolikoj asertas ke ĝi ek-  
zistas; Protestantoj ridas  
pri ĝi (R)  
-dombesto  
-plej alta celo de la ŝtato  
rilate la eksterlandan po-  
litikon (adjektivo)  
-lando el la malproksima  
oriento (R)  
-tre granda simio (R)  
-ilo por mezuri angulojn(R)

45 7 5I 72 3 I 67  
2 20 37 I 74 I7 54 70 I2  
50 I3 59 8 40 I6 64 5  
47 64 5 9 62 2I 28 44 37 4  
6 I4 3I I9 22 23 I3 68 60  
I6 42 62 I9 54 57 46  
7I 38 55 I2 48 3 4I 26 37 25  
63 73 2I 69 II 5I 66  
46 3I 69 29 I9 I6 23 73 55 I9  
56 20 64 39 52 I8 29 45

1 ĝis 75 formas konsilon rilate la uzon de lingvoj.

Rim: Ĉar la aŭgusta N<sup>o</sup> tiel malfrue aperis ni donas prokraston por en-  
sendo de solvoj de ĝiaj enigmoj ĝis la Okt. Solvojn sendu al:  
F. Roosen, J. & M. Sabbestraat 12, Brugge.

(-)

Uit het zeer degelijke "Laborista Esperantisto" orgaan van de  
Federacio de laboristaj Esperantistoj en la regiono de la Nederlanda  
lingvo Nr 9 van 1 Sept.1946, halen wij het volgende "krasse" artikel:

Even vastleggen.

In "Holanda Esperantisto" verzorgde ik een rubriek onder bovenstaande  
titel, waarin we aan de kaak stelden al die gevallen, welke zo duidelijk  
de onmacht demonstreerden van hen die het zonder Esperanto af kunnen en  
de veeltaligheid handhaven. Meer dan vijftien jaren verstreken sinds-  
dien. Tientallen internationale congressen en conferenties van espe-  
rantisten uit alle delen der wereld vonden in die tijd plaats en niet  
minder in daaraan voorafgaande jaren sinds 1905. Men heeft nog niets  
geleerd en er is alleszins aanleiding die rubriek te doen herleven. Er-  
gerlijk is het van het stumperig gedoe te lezen, dat "intellectuelen"  
vermeten confereren en congresseren te noemen. Die dan nog dikwijls de  
euvlele moed hebben zich laatdunkend over Esperanto te uiten ! Hebben  
wij esperantisten de belangstelling van allen op onze bijeenkomsten,  
uit welk land zij ook afkomstig zijn, Min. van Boetzelaer had op de  
Parijse Vredesconferentie de belangstelling van iederen gedelegeerde,  
die Frans verstaat, schrijft Paraat van 9 Augustus j.l. en vervolgt  
verderop:

"Na de redevoering de monotonie van de vertalingen, dit wordt langza-  
merhand een nachtmerrie van deze conferentie. Laten wij even rekenen:  
"er zijn 21 naties en iedere natie wil natuurlijk aan het begin van de  
"conferentie iets over haar standpunt zeggen. Maakt 21 redevoeringen  
"maal drie, want er zijn steeds nog twee vertalingen aan te horen, in  
"t geheel dus 63 redevoeringen. Per dag komen drie redenaars aan de  
"beurt, met vertalers dus 9. Er zijn dus zeven dagen nodig -zeven werke  
"dagen- om het begroetingsdebat af te sluiten.

Als esperantist op uit je vel te springen. Maar het socialistische blad  
denkt er niet aan zich daarover te ergeren en onze congressen en confe-  
renties ten voorbeeld te stellen. Ook doet dat niet het Haarlems-Dag-  
blad van 7 Aug. als het den medewerker van United Press aan het woord  
laat, waaruit duidelijk de onmacht gedemonstreerd wordt om het vreem-  
detalenprobleem bevredigend op te lossen.

Zo, lezers, beraadslagen zij die over wel en wee van volkeren hebben te beslissen. Hier is dan

"Een beeld van de Vredesconferentie."

"De staatslieden puzzlen, lezen de krant of zijn in slaap gevallen, terwijl de volkeren der wereld wachten op de vrede, die zij zullen maken. Dit is de conclusie van een medewerker van United Press, die gedurende een half uur de gedelegeerden van de vredesconferentie gadesloeg. Hij tekent hier echter eerlijkheidshalve bij aan, dat de gedelegeerden genoodzaakt zijn elke rede driemaal aan te horen, daar de toespraken, behalve in de taal waarin zij worden gehouden, ook in het Frans en het Russisch worden voorgelezen. Een rede van een half uur wordt op deze wijze automatisch uitgebreid tot een rede van anderhalf uur. De correspondent constateerde dan, dat Attlee op 4.32 uur in een kruiswoordpuzzel verdiept was, dat 4.36 uur Evatt de zaal verliet toen de vertaling van een Brits-Indische rede werd opgedreund, dat om 4.37 alle aanwezige gedelegeerden de krant zaten te lezen met uitzondering van den Ethiopischen afgevaardigde, die in slaap was gevallen. Op 4.40 uur constateert de correspondent, dat de Amerikaanse afgevaardigde James Dunn, na enige ogenblikken in officiële documenten verdiept te zijn geweest, deze terzijde legt en zich verdiept in de sportpagina van de "Daily Telegraph". Terzelfdertijd ontdekt hij, dat de Nieuw-Zeelandse gedelegeerde begonnen is een brief te schrijven. Twee minuten later haalt de Brits-Indische gedelegeerde Peruses een brochure voor de dag getiteld "Wat biedt Parijs", blijkbaar ter voorbereiding van de Zaterdagavond. Op 4.50 uur ontwaakt de Ethiopiër, opgeschrikt door het applaus waarmede een nieuwe spreker wordt begroet, om 4.52 uur haalt Spaak een roman in gele omslag uit de zak.... en zo gaat dit nu al zes dagen door....

Zes dagen vredesconferentie, die er zestig en meer worden ! En dat wil ons wijs maken, dat de halve wereld Engels spreekt en dat men daarmee overal in de wereld tegecht kan.

-----  
Fulmobriloj en la E° movado.

Du mocioj.

Antaŭ kaj dum la ĝenerala jarkunveno de nia grupo "Paco kaj Justeco" ni pristudis la organizon kaj la dividon tiurilate en la Esperantistaj rangoj. Tiam ni publikigis mocion (vidu n°2 de la 5<sup>a</sup> jaro Januaro 1946). Ni ricevis respondojn de U.E.A. kaj ankaŭ kelkaj gazetoj presis ĝin. Tamen la nombro estis relative malgranda. Eĉ "Flandra Esperantisto" ne presis ĝin, kvankam ni estas sekcio de Flandra Ligo. Oni povis supozi ke la afero ne interesis la redakcion de nia Flandra organo. Tamen dum la kongreso kiu okazis je Pentekosto en Brugge la ligo estraro prezentis mocion...pri la sama temo !...kaj esence, se ne laŭforme, la sama kiel la nia !! Nur la ligestraro forĝis mencii ke sekcio Brugge jam antaŭe pristudis la aferon kaj antaŭe venis al la sama konkludo al kiu ili poste venis !

Flandra Ligo sendis tiun mocion al la gazetaro kaj, feliĉe, relative multaj presis ĝin. Ankaŭ "Paco kaj Justeco" presis ĝin (vidu n°9 de 5<sup>a</sup> jaro Julio 1946). Ankoraŭ pli feliĉa fakto estas - verŝajne pro la instigado de ankoraŭ multaj aliaj E° organizoj - ke akordiĝo venis inter I.E.L. kaj U.E.A. kiel oni povas legi sur alia loko en ĉi-tiu numero. De la celo estas atingita ! jen la ĉefa afero. Kaj koncerne la malĝentilajn de "Flandra Ligo", nu, por unu fojo, ne gravas.

Cu la neŭtrala E° movado antaŭ aŭ post la fakaj E° movadoj?

En "S.A.T.Amikaro" Junio 1946 mi legis artikolon de Sro W.F.Kruit provizora sekretario de I.E.A.komitato en S.A.T. titolitan "Kie estas nia loko ?" en kiu li defendas la agon de la redaktoro W.F.Rolt de la revuo "Per unu voĉo". (nun: "Libera Tribuno") kiu fondis laboristan E° movadon en Sud-Afriko antaŭ ol ekzistas tie neŭtrala E° movado.

Mi citas du frazojn: 1) "...atentinda instruo, kiun povus utiligi al si pluraj esperantistoj, laborantaj en neŭtralaj organizoj, kvankam ili pli trafe kaj pli fruktodone povus agadi en la laborista-E° movado". 2) "...necesas kaj ĝustas, ke en la neŭtrala movado agadu la neŭtraluloj mem kaj ne tiuj kiuj mem akceptas difinitan koncepton. Esperanto ne estas nura lingvo..."

Per tiu lasta frazo W.F.Kruit ŝajnas diri ke la neŭtrala E° movado laboras sen ia ajn ideo aŭ idealo. Kaj la interna ideo ? .../...

